
# starto

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO




1978 · 6 · (70)

STAVOKONSTRUKCE
NP

NABÍZÍ VŠEM PROJEKTANTŮM
NOVÝ OBVODOVÝ PANEL

**F 300**

K POUŽITÍ PRO OPLÁŠTĚNÍ
PRŮMYSLOVÝCH BUDOV

Technické podmínky zašle
a další informace podá
odbytové odd., tel. 75 93 21-4

Stavokonstrukce n.p.
Praha 1
U půjčovny 9

# ANTAŬ LA JARŜANĜO

Denove unu jaro de nia Asocio venas en la historion. Ĉu ĝi estis sukcesa kaj prospera jaro? Ĉu ĝi signifis daŭrigon de nia disvolvo? Ĉiu el ni povas mem respondi tiujn ĉi demandojn.

Oni povas fari konkretan bilancon surbaze de nia laboro, tamen pluraj niaj devoj restis neplenumitaj. Mi vidas la ĉefan taskon en pliprofundigo de la agado en la lokaj grupoj, el kiuj unuj prosperas modele, aliaj montras ĝeneralan viglecon, sed estas ankaŭ tiaj, kies laboro stagnas kaj ili ekzistas sole laŭnome.

Certe la proksimiĝanta 3-a kongreso de nia Asocio montros novajn vojojn kaj eblecojn ...

La jarŝanĝo ĉiam signifas rerigardon. Antaŭ nelonge okazinta laborkonferenco en Poděbrady kaj la interŝanĝo de spertoj tie kaj dum la aŭtuna kunsido de nia Centra komitato montris kaj la pozitivajn kaj negativajn aspektojn en la laboro de lokaj grupoj, sekcioj kaj komisionoj, sed ankaŭ en niaj centraj organoj. Ili estu por ni gvidaj.

Eluzante la okazon mi dankas al vi ĉiuj pro la farita laboro, pro la bona volo kaj deziras al vi plenan sanon, familian kaj profesian kontentecon. Ni ĉiuj daŭrigu nian penadon por la tutmonda paco kaj interkomprenigo helpe de nia Internacia lingvo.

Josef Vítek

# MEM·peranto

JARKONFERENCO DE MEM-SEKCIO

okazis la 4an de novembro en Prago. Partoprenis 63 delegitoj. Inter la gastoj, kiuj salutis la kunvenon, estis plue prezidanto de la slovaka sekcio D-ro F. Ŝatura kaj la prezidanto de ĈEA J. Vítek.

Pri la agado en la pasinta periodo raportis la sekcia prezidanto O. Knížchal, akcentinte la solenan etoson de la konferenco, kiu okazas en la jubilea 25a jaro de Mondpaca Esperantista Movado. Li informis la partoprenantojn pri la kontrakto pri kunlaboro ĵus subskribita de la reprezentantoj de Ĉs. Packomitato kaj la federacia MEM-sekcio.

En la diskuto oni pritraktis aktualajn problemojn de la porpaca laboro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. D. Kočvara raportis pri la lasta ĝenerala konferenco de MEM en Varna. Oni pritraktis i.a. reĝustigojn en la sekcia statuto rilate la fakojn IKUE kaj KELI. Poste estis elektita la nova sekcia komitato kun la prezidanto D. Kočvara.

En la ferma parto la konferencanoj aprobis rezolucion pri la perspektivaj agadoj de la sekcio kaj protestan leteron al Ĉs. Packomitato kontraŭ la neutrona bombo.

AŬTUNA RENKONTIĜO DE IKUE-FAKO DE MEM-SEKCIO okazis la 7an kaj 8an de oktobro en Česká Třebová. Oni raportis pri la agado dum la pasinta jaro, elektis la novan estraron kaj precizigis agadplanon de la fako por 1979. En sia plano por 1979 IKUE-anoj antaŭvidas i.a. okazigon de tri renkontiĝoj, partoprenon en SET Lančov kaj aliaj someraj lernejoj, kunlaboron al preparo de kelkaj internaciaj fakaj aranĝoj kaj aperigadon de sia bulteno. En la distra parto de la programo oni spektis i.a. riĉan kolekton da diapozitivoj. La renkontiĝon partoprenis pli ol 50 personoj. Prezidanto de la IKUE-fako estis reelektita s-ro Aleš Berka.

(t)

SEMINARIO EN GDAŃSK. Sub la devizo Balta maro, maro de la paco, kunvenis esperantistoj pacdefendantoj el Hungario, Bulgario, Finnlando kaj ČSSR en la pola urbo Gdansk. La aranĝon ĉeestis prezidanto de la vojevodia komitato de Nacia fronto. La partoprenantoj vizitis la memorindan lokon en Westerplate kaj metis tie florkronon. Solenan paroladon omaĝe al la jubileo de MEM faris en la nova urbodomo prez. de la pola sekcio de MEM J.Koseniak. La ĉefreferaĵon pri la medio-protekto de la Balta maro prezentis d-ro W. Aleksandrowicz. Vicprezidanto de ĈEA D.Kočvara informis pri la pacagado de la ĉs. esperantistoj.


»o«

## Grava kontrakto

En novembro 1978 estis subskribita kontrakto pri la reciproka kunlaboro inter Ĉeĥoslovaka Packomitato kaj Ĉeĥoslovaka sekcio de MEM. La dokumenton subskribis la oficanta vicprezidanto de ČSPK d-ro J. Mudroch kaj la prezidanto de la federacia MEM-komitato d-ro F. Šatura. Ĉeĥlingvan tekston de la kontrakto ni publikigas en tiu ĉi numero.

ZASEDÁNÍ ÚV ČES. Poslední zasedání ÚV Svazu před sjezdem, které se konalo 18. listopadu v Praze, projednalo zprávu o činnosti předsednictva od jarního zasedání a schválilo návrh plánu činnosti, jakož i rozpočet Svazu na příští rok. Dále projednalo sjezdové materiály a organizační zajištění III. sjezdu ČES.





# DOHODA

## o zásadách vzájemné spolupráce

mezi Československým mírovým výborem (dále ČSMV) a Mírovým výborem při Československé esperantské federaci (dále MV ČSEF).

Vycházejíce ze závěrů Konference o bezpečnosti s spolupráci v Evropě,

z usnesení Světového kongresu mírumilovných sil v Moskvě a z dohody mezi Světovou radou míru a Světovým hnutím esperantistů pro mír, členem SRM, uzavřené na tomto kongresu,

a z přání sjednotit všechny mírové síly

se obě strany dohodly na těchto zásadách vzájemné spolupráce:

Č S M V

- bere na vědomí, že MV ČSEF vyvíjí svou činnost v souladu s cíli SRM a čs. mírového hnutí a prostřednictvím národních esperantských organizací v ČSSR spolupracuje s orgány čs. a mezinárodního mírového hnutí,
- v souladu s dohodou mezi SRM a Světovým hnutím esperantistů pro mír bude tuto spolupráci podporovat,
- bude se metodicky podílet na významných akcích MV ČSEF pořádaných mezi domácí a zahraniční veřejností,
- prostřednictvím svých publikací bude umožňovat šíření informací o mírových cílech esperantského hnutí, jakož i informací v esperantu o mírové politice ČSSR a jejím mírovém hnutí, a podle možností i potřeby napomáhat vydávání příslušných publikací v tomto jazyce,
- bude zvát zástupce MV ČSEF na svá plenární zasedání, případně k účasti na jiných akcích, uzná-li to za vhodné.

M V Č S E F

- prostřednictvím výborů, komisí a místních skupin národních esperantských organizací v ČSSR a dostupných sdělovacích prostředků bude seznamovat esperantskou i ostatní veřejnost doma i v zahraničí s cíli mírové politiky Československa a s činností čs. mírového hnutí,
- bude koordinovat svou činnost v souladu s plány činnosti ČSMV a SRM a seznamovat s nimi funkcionářský aktiv prostřednictvím tisku, na seminářích s mírovou tematikou a na dalších akcích,
- bude zastoupen v komisi pro zahraniční otázky a propagandu ČSMV a bude se podílet na realizaci jejích usnesení.

| | |
|---|---|
| Úřadující místopředseda ČSMV: | Předseda MV ČSEF: |
| dr. Josef Mudroch | dr. František Šatura |



LA NAŬAN FOJON EN MĚLNÍK

# ALTNIVELE, VARIE...

La IX-a Internacia Renkontiĝo en ĉarma urbo Mělník ne nur inde viciĝis al la antaŭaj Renkontiĝoj, sed daŭrigante jam la gloran tradicion, ĝi superis ilin laŭ la aranĝo kaj programo. Sabate la 7.10. J. Vítek, prezidanto de ĈEA kaj de la loka klubo, bonvenigis ĉiujn partoprenantojn en la kastela korto. Sekvis trarigardo de la urbo en du grupoj kaj trarigardo de la urba galerio, ekskurso al kastelo Liběchov, kie troviĝas altvaloraj artaĵoj el Oriento, kaj poste ascendo al la memorinda monto Říp. La alia grupo ekskursis al Doksy. Vespere okazis dancvespero. Dimanĉe en Kulturdomo de kpt.Jaroš okazis solena matineo. La tuta spektaklejo estis plena. J. Vítek sinsekve prezentis unuopajn programerojn kaj komentis. Akordiona orkestro de R. Deke el Dresdeno gradigis la solenan etoson per pluraj trafe elektitaj komponaĵoj, junvirina ensemblo el EK Prago recitis poemon de J. Wolker "Kanto de negero", sekvis monologo el la Apokrifoj de K.Čapek en mirige eminenta prezento de Eva Seemannová, grandan merititan aplaudon rikoltis naciaj kantoj de du knabinoj kun gitaroj, poste la sama kvarmembra junvirina ensemblo prezentis sub gvido de E. Seemannová "Voĉoj el malproksimo", popolan poemaron. Prezento de "El leteroj de Božena Němcová" pro la artisma kunmeto de la temo montris grandecon de la verkistino kaj en prezento de Eva Seemannová estis kulmino de la ma-





ţineo. La publiko ne avaris pri aplaŭdo kaj la aranĝintoj ne ŝparis multajn bukedojn kaj aliajn donacojn al ĉiuj rolintoj. Ĉeestis ĉ. 200 partoprenantoj el pluraj lokoj de nia respubliko, el GDR (18 lokoj), Pollando kaj Aŭstrio.

La renkontiĝon modele preparis la loka ER sub gvido de J. Vítek kaj la junularo el Mělník.

(vk)






# ❀PLÁN ČINNOSTI ČES NA ROK 1979❀

Plán činnosti Českého esperantského svazu je ovlivněn v příštím roce III. sjezdem Svazu, vytvářením podmínek pro zlepšení organizátorské práce ústředí i jednotlivých místních skupin a prohlubováním spolupráce se ZE SSR, organizací esperantistů v NDR a Světovou esperantskou společností (UEA). V následujících řádcích přinášíme shrnutí hlavních bodů činnosti ČES.

## HLAVNÍ ÚKOLY SVAZU

Uspořádat III. sjezd a zpracovat program seminářů pro nové funkční období s cílem systematicky vyškolit místní skupiny v různých oblastech působení. Seznamovat esperantskou i neesperantskou veřejnost s cíli i záměry hnutí a vést místní skupiny k trvalé občanské angažovanosti. Prohlubovat spolupráci s Českou mírovou radou a dalšími společenskými organizacemi NF a rozšiřovat působení v řadách mládeže. Trvale propagovat českou a slovenskou kulturu v zahraničí. Pokračovat v jednání s ministerstvem školství o možnostech výuky esperanta ve školách, zájmových kroužcích a školních družinách.

## KULTURNĚ VÝCHOVNÁ ČINNOST

Systematicky informovat a usměrňovat členskou základnu a funkcionáře Svazu tak, aby byly uskutečněny závěry III. sjezdu. Uspořádat kulturně politické, sportovní a turistické akce a umožnit na nich účast také neesperantistům. Uspořádat výstavu dětských kreseb z ČSSR a zahraničí.

## SPOLEČENSKÁ ANGAŽOVANOST, VÝUKA, TURISTIKA, EDIČNÍ A PROPAGAČNÍ ČINNOST

Společně s místními skupinami odevzdat alespoň 2 000 kg odpadových surovin, získat 5 čestných dárců krve, odpracovat při plnění volebních programů v místech MS alespoň 500 brigádnických hodin.

S Turistickou komisí zabezpečit výměnné zájezdy členů svazu do zahraničí a prověřit možnosti a podmínky pro vybavení jednoho autokaru na 64. Světový kongres esperanta do Luzernu.

Připravit seminář pro funkcionáře Svazu s účastí lektorů ze zahraničí. Uspořádat svazové zkoušky z esperanta.

Vydat dvě čísla časopisu PACO a jeho separátů, šest čísel časopisu STARTO včetně 4 čísel Medicinistaj Informoj a kulturního almanachu Panoramo. Připravit vydání Fučíkovy Reportáže psané na oprátce v esperantu a Povídek z jedné kapsy od K. Čapka. Zajistit zhotovení drobného propagačního materiálu.

## ZAHRANIČNÍ STYKY

Rozvinout spolupráci s NDR a uzavřít družební styky mezi místními skupinami. Prohloubit spolupráci s esperantskými organizacemi BLR, MLR, PLR a SSSR zejména v oblasti výměny informací a zkušeností, v oblasti spolupráce s UEA, ve vědecko

technické oblasti, turistice a výměně literatury. Zúčastnit se 64. Světového esp. kongresu v Luzernu.

(Resumo: la ĉefaj trajtoj de la agadplano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en 1979 en la sfero de edukado, instruado, propagando, turismo kaj eksterlandaj rilatoj.)

✽

## PRI SCIENCO KAJ TEĤNIKO EN ŽILINA

La 7-8an de oktobro 1978 kunvenis en Žilina 56 slovakaj, ĉeĥaj kaj hungaraj fakuloj kaj okupiĝis pri apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko. La aranĝon organizis la scienc - teĥnikaj sekcioj de AE SSR kaj ĈEA kaj la Sindikata Domo en Žilina.

Probable ĝi estis la unua tiaspeca aranĝo en Ĉeĥoslovakio, principe diferenca disde la kutimaj amikokunestaj renkontiĝoj. Prezentitaj 16 referaĵoj estis variaj, tamen estas eble dividi ilin al du grupoj:
1. Lingvo kiel komunikilo,
2. Temoj el aplikitaj sciencoj kaj teĥniko.

Pozitivaj trajtoj de la seminario estas kelkaj: bona faka kaj lingva niveloj, procedo sen organizaj mankoj, bela medio en la Sindikata Domo, subteno de la Asocio de Esperantistoj en SSR kaj ne lastvice la partopreno de fakuloj el preskaŭ ĉiuj regionoj de Ĉeĥoslovakio.

Alte aprezata estis la pretigo de kolekto de seminariaj referaĵoj, kiun ricevis ĉiu partoprenanto antaŭ la malfermo de la seminario. Plua tiaspeca aranĝo estas planata por la jaro 1980, denove en Žilina.

(we)

## S E F T 1979 PREPARATA

En la distrikto Neŭbrandenburg, GDR, kunvenis en aŭgusto meze de belaj lagoj esperantistoj el Hungario kaj GDR. Pro la granda sukceso de tiu ĉi kampadeja eksperimento la partoprenintoj decidis ripeti ĝin en la jaro venonta. La SEFT-79 okazos inter la 18a kaj 25a de aŭgusto sur la tendara areo C-86 en la arbaro ĉe Thomsdorf en la regiono Feldberg.

Ĉiu partoprenonto devas mem zorgi pri sia tendo, manĝado ktp. Distrikta Laborrondo peras nur adresoj inter ĉiuj interesatoj kaj donas iujn informojn pri la regiono, vojaĝeblecoj ka. La eksterlandanoj aliĝu post la alveno ĉe la tendar-oficejo (La aliĝo eblas nur por civitanoj el socialismaj landoj). Turnu vin al la Distrikta Laborrondo Esperanto, GDR-20 Neubrandenburg, Leibnitzstr. 5/67, s-ro W. Pfennig.

---

ĈEĤOSLOVAKA MINISTERIO DE TRAFIKO informis Ĉeĥan Esperanto-Asocion pri sia preteco enkonduki la Esperantan version de klarigaj notoj en la horaron de la ĉs. fervojoj.





# KUNIGI NIAJN FORTOJN

KELKAJ PENSOJ EL LA PAROLADO DE H. TONKIN EN LA 63a UK

Kvankam la tempo laboras por ni, en la senco, ke pli da homoj fariĝas konsciaj pri la politika rolo de la lingvo kaj la danĝeroj de lingva subpremigo, tamen pri lingvaj demandoj la homaro generale restas ankoraŭ iom needukita, ankoraŭ ne plene komprenata. Sekve, la tasko antaŭ ni estas granda. Ĝi estas nenio alia ol eduki la mondon pri lingvaj demandoj kaj montri al ĝi la solvon almenaŭ al multaj tiaj demandoj - nome Esperanton.

■

Unu el la plej kuraĝigaj evoluoj de la lastaj jaroj estas ĝuste la kresko de scienca interesiĝo pri Esperanto. Tio ne necese okazas flanke de esperantistoj mem en plej malvasta senco, sed flanke de objektivaj sciencistoj, kiuj trovas en Esperanto unikan lingvan fenomenon, kiu bezonas esploron. Tiuj homoj per sia objektiveco helpas al ni, ĉar la sciencistoj estas la homoj al kiuj la politikistoj sin turnas, kiam ili bezonas solvojn de demandoj.

■

Kio malhelpas, ke Esperanto ne pli rapide progresas ol ĝi progresas nun? Unuavice, laŭ mi, la fakto, ke ni ne ĉiam laboras konsekvence. Oni ne povas konvinki saĝajn homojn per duonbakitaj argumentoj. Oni ne povas persvadi klerajn homojn per nura svingado de standardo. Se ni volas konvinki la eksterstarantojn, necesas evoluigi saĝajn argumentojn bone prezentitajn ... Nia argumentado por Esperanto devas esti en konstanta stato de ŝanĝiĝo. Ni devas aktualigi niajn argumentojn, ni devas fronti la nunan situacion, ni devas kompreni, ke eĉ dum ni atendas, ke oni venu al Esperanto, la internacia lingva situacio ŝanĝiĝas.

■

Kaj kion ni unuopuloj fine povas fari por atingi la sukceson de Esperanto? Kiel ligi nin al tiu ĉi nobla idealo? Unue, ĉiu el ni analizu la proprajn talentojn. Nia tasko estas kunigi tiujn talentojn efike. Se ni povas fari tion, ni povas konsistigi forton absolute nevenkeblan.

■

# Iniciato venis el Petrogrado

Pri la unuaj paŝoj de la sovetia esperantista movado rakontas en Der Esperantist (3/78) S. Podkaminer. Ni represas fragmenton de lia artikolo:

La iniciato starigi amasan movadon venis de malgranda grupo de esperantistoj-komunistoj. Ili kreis en 1920 organizon ESKI (Esperantista Sekcio de Komunista Internacio). La estraro de ESKI konsistis el Drezen, Ort Sunnam kaj Oĥitovič, kiuj publikigis deklaron kaj kelkajn cirkulerojn kun la celo unuigi ĉiujn progresemajn esperantistojn en la lando. En multaj urboj baldaŭ konstituiĝis ESKI-grupoj.

Estis klare, ke relative malgranda grupo de esperantistoj komunistoj ne povas preni je si organizadon kaj gvidadon de la ĉiutage kreskinta movado. Necesis kunvoki tutrusian Esperanto-kongreson kaj fondi la tutsovetian organizon. La sovetia registaro aprobis tiun ĉi iniciaton. Oni konstatis, ke la plej taŭga loko por la kongreso estas Petrogrado, kie malgraŭ malamika pasiveco de la estraro de "Espero" (societo fondita en 1891, kiu havis ĝis tiam la gvidan rolon en la landa movado - rim. de red.) aktivis kelkaj junaj, energiaj kaj progresemaj esperantistoj. Ili komprenis, ke sen forigo de la funkcianta estraro neniuj aranĝoj en Petrogrado estus eblaj. Helpis esperantistoj-politikaj elmigrintoj el burĝaj Estonio kaj Latvio, studintaj Esperanton en malliberejoj de tiu ĉi ŝtatoj kaj tiutempe lernantoj en la petrograda komunista universitato de Marĥlevski. Tio estis Kamaradoj Ranca, Kalinka, Salo, Pedo-Vinkel k.a. Laŭ ilia iniciato pli ol 60 gestudentoj membriĝis al la societo kaj la progresema anaro ricevis grandan plimulton. Estis elektita nova estraro, kies unua paŝo estis aktiva preparado de la III-a tutrusia (la unua sovetia) Esperanto-kongreso. La preparan komitaton eniris i.a. Bykovska, Čače, Mader, Podkaminer kaj Teterin.

La 21an de majo 1921 okazis solena inaŭguro de la kongreso, kiun partoprenis pli ol 200 esperantistoj el diversaj regionoj de la lando. La kongreso fondis Sovetrespublikaran Esperantistan Unuiĝon (SEU), kiu baldaŭ fariĝis unu el la plej grandaj kaj aktivaj esperantistaj organizoj en la mondo.


---


GAZETARA SPEGULO. 34 gazetoj kaj ĵurnaloj en la ĉeĥaj landoj informis pri Esperanto en la pasinta jaro 1977 entute per 110 artikoloj kaj informoj. Laŭ la gazet-eltranĉaĵoj haveblaj plejmulte da ili aperis en Mezbohemia (47) Orientbohemia (21) kaj Sudmoravia regiono (16).

---

KOREKTO. Preskoboldo enŝteliĝis en la artikolon Esperantista pacmovado eniras la duan kvaronjarcenton, pĝ. 5 de la lasta n-ro, kie anst. servo devas esti korekte revo. Ni pardonpetas ankaŭ pro kelkaj gramatikaj eraroj en la rubriko KRONIKO.






**Dekdu ĉapitroj pri la sindefendo** (suplemento)

**La aŭtoroj:** Inĝ.J.Novák kaj Inĝ.I.Špička

**La desegnaĵojn faris:** L.Špaček

Tiun ĉi batalagon oni povas efektivigi sen malfacilaĵoj dum 0,12-0,13s kaj ĝi apartenas al la plej rapidaj batalagoj ĝenerale.

## 1.2.1.3. Pezeco kaj rapideco de la rektmanfrapo

Grandeco de la kineta energio de ajna objekto dependas, kiel estas konate, de ĝia rapideco kaj maso. Ĉi-loke ni ne okupiĝos pri la problemo, kiel pligrandigi la mason aŭ la rapidecon de moviĝantaj partoj de unuopaj membroj. Ni montros, kiamaniere konstrui laŭeble plej rapidan rektmanfrapon, se la rapidecoj de $K_1$ kaj $K_2$ estas starigitaj.

Ni supozu, ke la angulaj rapidecoj $\omega_1$ de $K_1$ kaj $\omega_2$ de $K_2$ estas egalaj. En ĉi okazo ili ĉirkaŭiros en la tempounuo la egalajn angulojn $\alpha_1$, eventuale $\alpha_2$. Se la frapsurfaco U proksimiĝu celen laŭ rekto, devas validi: $\alpha_1 = \alpha_2$. Pretumon, kiu evidente respektas tiun ĉi kondiĉon, vidu sur la fig.12b.

Kiel montris nia mezurado de rapideco de unuopaj movoj fare de la antaŭbrako aŭ la fleksita brako, rilato inter la angulo, kiun ĉirkaŭiras la unuopaj moviĝantaj korpopartoj, kaj la tempo, havas ĝenerale formon montritan sur la fig.18 (la t.n. <u>movokurbo de membropartoj</u>). Tiu ĉi kurbo havas tri partojn: <u>regionon de akcelata movo</u> (<u>I-a regiono</u>), <u>regionon de la konstanta movo</u> (<u>II-a regiono</u>) kaj <u>la regionon de la bremsata movo</u> (<u>III-a regiono</u>). La unua regiono komenciĝas en $t_0$ kaj finiĝas en $t_1$. En la punkto $t_1$ komenciĝas la II-a regiono, en $t_2$ la III-a regiono. Ĝi finiĝas en la punkto $t_3$, kie finiĝas la movo. Nepre evidentas, ke se la frapo estas efektivigata per movo fare de unu sola membroparto (aŭ per movo de la membro firmigita kiel unu tuto), sur kies ekstremo situas la frapsurfaco U, U atingos la maksimuman rapidecon en la II-a regiono. El la vidpunkto de atingo de maksimuma kineta energio estus plej oportune, se U trafus la celon en la II-a regiono.

El la fig.18 rezultas ankoraŭ alia konkludo, kiu estas unuavide jam malpli evidenta. Nome, se U atingos komence de la II-a regiono sian maksimuman rapidecon, ĉiu plua plilongigado de la <u>frapvojo</u> kaŭzos nur daŭrigon de la frapo, do ne pligrandigon de ĝia rapideco. Rilate al tio estus plej bone fini la frapon komence de la II-a regiono. Duaflanke, la frapo havu ankaŭ kiel eble la plej grandan atingon. El tiu ĉi vidpunkto estus plej oportune plenumadi frapojn fine de la II-a regiono. Por bezonoj de la praktiko estas necese akcepti kontentigan kompromison. Tamen se la daŭro de la frapo ĝis la fino de la II-a regiono ne estas pli longa ol la daŭro de la aktuala reagotempo ĉe la kontraŭulo, ne estas racie klopodi kurtigi la frapon ĉiapreze, senkonsidere al ĝia atingo. Tion, kion ni ĵus montris ĉe la frapoj prezentataj per la movo fare de unu membroparto (aŭ la membro firmigita kiel la tuto, ekzemple la elsuba krurfrapo, elsuba gambofrapo, <u>kubutfrapoj /elekstera, elsuba, elinterna, elsupra/</u>, <u>elsupra brakofrapo</u>, <u>elsuba brakofrapo</u>, ktp.) estas necese apliki ankaŭ ĉe la frapoj, kiuj konsistas el pli ol unu moviĝanta membroparto. Sed tio estas jam iom komplika kaj ĉi-loke ni ne povas detale trakti ĝin. Ni nur atentigas, ke la rapideco de U ĉe la rektmanfrapo proksimiĝas rapide al nulo, se la angulo $\beta$ inter $K_1$ kaj $K_2$ pligrandiĝas al 180°. Se oni trafus la frapcelon per etendita brako, en la rektmanfrapo estus aplikebla nur la kineta energio de la trunko, do ne tiu de la brako. Por ke estu utiligebla ĉi-cele ankaŭ la kineta energio de la moviĝanta brako, la angulo $\beta$ estu $< 180°$. Tiu ĉi aserto estas logike tute memkomprena. Tamen el la kutima intuicio ĝi ne rezultas.

Kiamaniere dedukti grandecon de $\beta$ ? Tiu ĉi demando ne estas facile





fig.18



Fig.19



Fig.20




Fig.21 a b c d




Fig.23 a b c d



respondebla. Se oni scius konkretajn movokurbojn por $K_1$ kaj $K_2$, esence estus eble dedukti (por koncerna unuopulo) la optimumajn parametrojn de la pretumo (t.e. antaŭ ĉio la optimuman angulon $\beta$). Tamen en la praktiko oni kutime procedas alie. Por ĉi celo estis en nia lando ellaboritaj oportunaj duonempiriaj metodoj. Ilia priskribo ja estas ekster la kadro de tiu ĉi artikolaro. Ni nur konstatas, ke ili ekzistas.

### 1.2.1.4. La trunkomovo kaj la movo fare de la batanta brako

Kunigo de la movo fare de la batanta brako kun la movo fare de la rotacianta trunko prezentas la plej gravan fonton de plipezigo de la bato. Tiu ĉi problemaro estas ja tre komplika. Ni nur atentigas, ke por ke la bato estu kiel eble plej efika, la frapsurfaco devas trafi la frapcelon en direkto de la tanĝanto al la korpomovo. Male, se la frapsurfaco proksimiĝas celen en la direkto de la normalo al trunkorotacio (do ortangule al la menciita tanĝanto), la trunkorotacion oni ne povas plu profiti por plipezigo de la bato.

Por plipezigi la baton oni povas uzi ankaŭ la translacian movon fare de la propra korpo. Tiamaniere oni procedas ofte, finante la translokiĝon al la kontraŭulo. La batoj, ĉe kiuj oni utiligas tiamaniere la translacion de la propra korpo, povas esti mirinde pezaj. Tamen oni ne forgesu, ke la fina pezo de la bato dependas de firmeco de minimume rezistema korpoparto de la batanto. Tiu ĉi minimume rezistema korpoparto estas ofte nesufiĉe hardita frapsurfaco aŭ malbone firmigita (aŭ firmigebla) manradiko, ŝultro, meza parto de la trunko ktp. Jen kaŭzo, kial la frapo estas malpli efika, ol ĝi estus adekvate al grandeco de la kineta energio de la moviĝanta korpo de la batanto fine de la bato.

La korpomovo strikte dependas de utiligata gardostaro. Do ekzemple, la trunkorotacion oni povas efektivigi plej bone el la atakgardostaro, aŭ el la batalgardostaro (fig.19). El la frunta gardostaro (fir.20) tio estas ĵam malpli facila, el iuj gardostaroj, utiligataj ekzemple en karateo, la trunkorotacion ĉe la rektmanfrapo oni entute ne povas realigi. Simile estas necese elekti oportunan gardostaron, se oni volas plipezigi la baton per translacio de la propra korpo. Bati sen trunkorotacio de la propra korpo en la direkto de la bato ne estas rekomendinde, escepte la kazojn, kiam oni uzas armilojn.

### 1.2.2. Frapsurfacoj kaj la rektmanfrapo

En la literaturo pri karateo, klasike komprenata sindefendo ktp, oni priskribis relative grandan nombron da diversaj frapsurfacoj por la rektmanfrapo. Krom la jam menciitaj pugno aŭ manplato (fig.21a) ili estas ekzemple dismetitaj fingroj (fig.21b), fingreloj (1)(fig.21c), fingroj (fig.21d) ktp. En la sindefendoj MS-1, QS-1 (KvS-1) kaj en branao oni uzas al ĉi celo nur la pugnon, manplaton kaj la fingrojn (eventuale dismetitajn). Tamen la lasta frapsurfaco estas rekomendinda nur escepte kaj oni trafu per ĝi la plej facile vundeblajn lokojn sur la kontraŭula korpo.

### 1.2.3. La frapceloj

En la sindefendoj MS-1, QS-1 (KvS-1) kaj en branao oni trafas per la rektmanfrapoj, uzante pugnon aŭ manplaton, nur frapendajn lokojn sur la kapo de kontraŭulo, nome la mentonon el antaŭe (plej bone kontraŭ la pezocentron de la kapo) aŭ la vangojn el ekstere. Trafadon de ceteraj frapendaj lokoj sur la kontraŭula korpo, kiujn oni al ĉi celo utiligas en klasikaj batalkompleksoj (karateo, ĵuĵucuo, ktp.), ni ne rekomendas, ĉar ilia fidindeco estas rilate al tiuj pli supre rekomenditaj malpli granda.

## 1.2.4. La rektmanfrapo kaj nepafarmiloj

Trafi la frapcelon oni povas per oportuna korpoparto (frapsurfaco) aŭ armilo. Uzita armilo pligrandigas atingon de la bato aŭ ĝian pezon (anstataŭas ofte ne sufiĉe harditajn aŭ firmigeblajn frapsurfacojn). La rektmanfrapojn efektivigitajn per malgranda frapsurfaco ni nomas pikoj. La meĥanismo de la rektopikoj per tranĉilo, pugneo (2) aŭ bastoneto praktike ne diferencas de tiu ĉe la rektmanfrapo per la pugno. La rektmanfrapojn per armiloj oni povas sen malpligrandigo de ilia efiko praktiki eĉ sen trunkorotacio aŭ translacio de propra korpo en la direkto de la bato. Sekve oni batas ofte ankaŭ per antaŭŝovita brako. Per la bastono oni pikas ekzemple laŭ la fig.22. La meĥanismo de tiu ĉi bato estas do praktike identa kun tiu ĉe la laŭflanka rektmanfrapo per la manplato aŭ per la pugno.

### 1.2.4.1. Teno de armilo

Batante oni povas teni tranĉilon laŭ la fig.23a (forpugnobaza teno), fig.23b (interfingra teno), fig.23c (forfingra teno) kaj fig.23d (forpoleksa teno). La manierojn el la fig.23b kaj 23c oni uzadas ofte ne nur ĉe la rektmanfrapo per tranĉilo (= rekta tranĉilpiko = rektopiko per tranĉilo), sed ankaŭ ĉe tiu efektivigata per bastoneto aŭ pugneo. La forpugnobaza teno estas al ĉi celoj neoportuna. Oni utiligas ĝin plejofte ĉe la pikoj, kies meĥanismo estas praktike identa kun la meĥanismo de la manfrapo flanken aŭ elsupra manfrapo (ekzemple piko flanken, elsupra piko ktp.).

---

(1) FINGRELOJ estas frapsurfaco montrita sur la fig.21c.
(2) PUGNEO estas iu ajn armilo, kiu ne plilongigas la atingopovon de la brako kaj estas destinita nur por firmigo de la pugno aŭ anstataŭado de ne tro harditaj frapsurfacoj ĉe la fino de la brako (ĝi kutime anstataŭas la pugnon, pugnobazon ktp.). PUGNEI = bati uzante pugneon.




Fig.22

FINO

Vi ŝparos vian tempon, kaj lokon,
Vi atingos plenan orientadon
per

**ujo por magnetofonaj kasetoj:**

kolore ellaboritaj kun ebleco kunmetadi la kasetojn en pli grandajn tutaĵojn, event. kroĉi survande.
Facila elpreneblo de kasetoj: la ujo havas premrisorton.
Prezo Kčs 15,-


**ujo por diapozitivoj:**

en 4 kasetojn librosimilajn eblas enmeti 144 diapozitivojn.
Prezo Kčs 50,-

Ambaŭ produktoj estas aĉeteblaj en la vendejoj de industrivaroj, en magazenoj kaj en la vendejoj de la produktanto:
Plzeňské dílo, produkta kooperativo,
Skladová 8, 317 55 Plzeň,
vendejoj: Plzeň, Smetanovy sady 13,
Plzeň, nám. Kratwurma 16,
Karlovy Vary, ul. K. Marxe 8.

**Ambaŭ produktoj estas mendeblaj ankaŭ remburse rekte ĉe la produktanto:**

**Plzeňské dílo,**
**Skladová 8, 317 55 Plzeň**



HALTU POR MOMENTO KAJ PENSU PRI VIA SANO

De tago al tago, de jaro al jaro vi senĉese ion kaptas, ĝis maksimumo streĉante la risorton de via sano. Kiel longe vi volas ankoraŭ toleri tion? Pripensu, ke vi havas nur unu sanon - kaj ebligu al ĝi por tre modera prezo tion, kion ĝi meritas : la kompleksan kuracadon en unu el la plej antikvaj kaj rekonataj banlokoj de Eŭropo.

ĈEĤOSLOVAKAJ BANLOKOJ
- oazoj de sano, trankvilo kaj inspiro -

BALNEA

KARLOVY VARY
FRANTIŠKOVY LÁZNĚ
MARIÁNSKÉ LÁZNĚ
JÁCHYMOV
TEPLICE V ČECHÁCH
PODĚBRADY
JÁNSKÉ LÁZNĚ - TŘEBOŇ
JESENÍK - LUHAČOVICE
TEPLICE NAD BEČVOU
o o o o o o o o o o o

BALNEA
PRAHA

Reprezentanto
de ĉeĥoslovakaj
banlokoj
kaj kurac-fontoj,
Pařížská třída 11,
110 01 PRAHA 1
ĈEĤOSLOVAKIO
Tx: 122 215


## / Kiu parolas kiun lingvon? /

En Unuiĝintaj Nacioj speciale en la Ĝenerala Asembleo,estas uzataj kvin oficialaj lingvoj; la angla, araba, ĉina,hispana, franca kaj rusa. Sed kiuj ŝtatoj uzas kiujn lingvojn? Al tio respondas la sekvaj notoj, prenitaj el "UN kaj ni" eldonata de UEA:

ANGLE parolas krom la anglalingvaj ŝtatoj ekz.Afganio,Aŭstrio, Brazilo, Cipro, Danlando, Finnlando, Germana Demokratia Respubliko, Islando, Irano, Israelo, Mozambiko, Nederlando, Norvegujo, Pakistano, Pollando k.a.

ARABE parolas dudeko de arablingvaj ŝtatoj.

Kvankam la ĉina lingvo kovras kvinonon de la homaro,en UN parolas ĝin nur Ĉina Popola Respubliko.

FRANCE parolas krom Francio kaj ekskolonioj en Afriko,kiel ekz. Ĉado, Benino, Gabono k.a. ankaŭ Albanio, Belgio, Rumanio, Greklando, Luksemburgo, Turkio, el la arabaj ŝtatoj Alĝerio, Maroko, Tunisio.

HISPANE parolas dudeko da nur hispanlingvaj ŝtatoj.

RUSE parolas Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Mongolio kaj Sovetunio.

NEOFICIALAJN LINGVOJN parolas pluraj landoj: Kamboĝo,F.R. Germanio, Italio, Japanio, Laoso, Portugalio kaj Jugoslavio sian propran lingvon (Jugoslavio serbokroate). En kelkaj kazoj la elekto de la lingvo dependas de personaj faktoroj.

—

## Klasici marxismu leninismu o národním a mezinárodním jazyku

Zde je tedy řeč jakožto produkt rodu. Že Sancho mluví německy a ne francouzsky, není rozhodně zásluhou rodu, nýbrž okolností. Ostatně přirozená, původní podoba řeči se v každém moderním vyspělém jazyce proměnila v národní jazyk, a to jednak historií vývoje jazyka z materiálu, který tu byl, jako u románských a germánských jazyků, jednak křížením a míšením národů, jako v angličtině, jednak koncentrací nářečí v rámci určitého národa v národní řeč, přičemž se tato koncentrace zakládala na koncentraci ekonomické a politické. Je samozřejmé, že individua budou moci jednou úplně kontrolovat i tento produkt rodu.

(Marx-Engels: Spisy, sv.3. Praha, Svoboda, 1958, s. 435.)

Na Proudhonovy první pokusy si už nevzpomínám. Jeho učednická práce o "Langue universelle" ukazuje, jak bezstarostně se pouštěl do problémů, k jejichž řešení mu chyběly i nejelementárnější znalosti.

(Marx-Engels: Spisy, sv. 16. Praha, Svoboda, 1965, s. 48.)

K tomu, aby různé národy svobodně a pokojně žily pospolu nebo se mohly rozejít (když je to pro ně vhodnější) a vytvořit různé státy, je nezbytně třeba naprostého demokratismu, který hájí dělnická třída. Žádnou výsadu pro žádný národ, pro žádný jazyk! Ani sebemenší útisk, ani sebemenší nespravedlnost vůči národnostní menšině - to jsou principy dělnické demokracie.

(V.I.Lenin: Spisy, sv. 19. Praha, SNPL, 1959, s. 81 - 82.)

Dělnická demokracie má tento národnostní program: naprosto žádné výsady pro žádný národ, pro žádný jazyk.

(V.I.Lenin: Spisy, sv. 20. Praha, SNPL, 1959, s. 14.)

Demokratický stát musí bezpodmínečně uznat naprostou svobodu různých jazyků a zavrhnout veškeré výsady jednoho jazyka. Demokratický stát nepřipustí potlačování či majorizování jednoho národa druhým v žádné oblasti, na žádném úseku veřejného života.

(V.I.Lenin: Spisy, sv. 20. Praha, SNPL, 1959, s. 228 - 229.)

Všechny národy ve státě jsou bezpodmínečně rovnoprávné a jakékoli privilegování jednoho národa nebo jednoho jazyka je považováno za nepřípustné a protiústavní.

(V.I.Lenin: Spisy, sv. 20. Praha, SNPL, 1959, s. 286.)

## NI ZORGU PRI LINGVOUZO

Lastatempe la redakcio de "Budapeŝta Informilo" faris iniciaton, kiu povas esti nur laŭdata. Temas pri la enkonduko de la nova "Scienca rubriko". Ĉiumonate la revuo alportas al la legantaro valorajn novaĵojn kaj sciindaĵojn pri la apliko de Esperanto en diversaj sciencobrancoj. La detala listigo de aranĝaj-programoj informas pri seminarioj kaj prelegserioj, kiujn partoprenas specialistoj, fake kaj lingve kvalifikitaj, por prezenti siajn referaĵojn en la Internacia Lingvo. Per anoncoj pri la eldono de libroj kaj revuoj, verkemaj scienculoj atentigas kolegojn kaj la esperantistan publikon pri sia valora laboro super teknikaj vortaroj kaj la publikado de artikoloj kaj prelegoj. Ne malpli gravaj estas la petoj faritaj de individuaj fakuloj pri helpo kaj kunlaboro rilate komunajn projektojn; tio ja estas bonega ekzemplo de utilaj profesiaj interrilatoj faciligitaj per Esperanto.

Pritraktendaj estas du ĉefaj aspektoj de la temo "Esperanto kaj Scienco". Unue, la disvastigo de informoj pri Esperanto en diversnaturaj sciencaj medioj celas interesi fakulojn pri Esperanto, generale kiel rimedo por forigi tutmondajn lingvajn barilojn, kaj specife por solvi interkomunikadajn problemojn sur la scienca tereno. Due, la plimulto de agado de esperantistoj en ĉiuj sciencaj brancoj nepre signifas, ke pli da verkoj aperos en Esperanto temantaj pri sciencaj aferoj. Unu el la rezultoj estos la rafinado kaj pliriĉiĝo de la scienca lingvo en Esperanto. La evoluo okazos en la direkto al pli preciza uzado de nun ekzistantaj terminoj kaj la kompilado de novaj terminaroj por sciencoj, kiuj ankoraŭ ne estis pritraktitaj en esperantlingvaj verkoj.

Se ĉiuj iniciatoj portos iom da fruktoj, estas atendeble dum la sekvaj jaroj, ke la nombro da prisciencaj verkoj en Esperanto rapide kreskos. Pro tio, estas eĉ pli grave nun zorgi pri la nivelo de lingvouzo, ne nur en verkoj destinitaj al relative malLarĝa rondo de samfakuloj, sed ankaŭ en tiuj kun sciencpopulariga karaktero direktitaj al la laika publiko.

(B. Golden)

## RONDETA VIVO

B R N O - Antaŭ 30 ĉeestantoj parolis la 21.9.pri la 63-a UK en Varna partoprenintoj de la kongreso Z. Hršel, Z. Mrkvica kaj Ing.J. Vojáček. Tre interese raportis f-ino Z.Hršelová pri la 63-a UK en radio - disaŭdigo por Sudmoravia Regiono.

EK arangis la 24.10.solenan koncerton omaĝe al la 60jara datreveno de ĈSR.Plenumis konataj muzikartistoj de Brno.

C H E B - Al jubileo de Ĉeĥoslovakio oni aranĝis la 20.10. teatran vesperon.Post la parolado de la klubestro Vrchota prezentis E.Seeman - nová teatraĵon "Jean kaj mi" de H. de Guelma. Inter la spektantoj estis gastoj el Prago, Plzen kaj Domažlice kaj pluraj neesperantistoj.

J A B L O N E C - Jam la tradicia Nikolaa vespero okazis la duan de decembro kun varia programo en granda salono de la Kulturdomo. Denove oni aranĝis tombolon por la solidareca fonduso.

Ĝojiga sciigo venis el la proksima urbeto Desná v Jiz. horách, kie la esperantistoj kunvenadas en la uzina klubejo de la iama hotelo Sklář.

K A R L O V Y V A R Y - La eblo uzi reprografian kaj multobligan maŝinon ebligis al la grupo en Karlovy Vary eldoni en la venonta jaro 20 ekz. de Heraldiko-Veksilologio-Terminaro en Esperanto, verko de grupestro J. K l e m e n t. Modesta stoko estos dissendata printempe 1979 al recenzistoj kaj mendintoj el la jaro 1977.

(jk)




Prelegante pri la tekniko de demonstra propagando ĉiam necesas emfazi en niaj propagandaj vitrinoj identecon de esperantistaj celoj kun nia socialisma socio. Nunjare tiel estis: 63-a UK de Esperanto, 34-a Kongreso de TEJO kaj la 11-a Festivalo de Junularo en Havano. Tiuj ĉi

kultur-politikaj eventoj estus kunigeblaj sub unu devizo: La interkompreniĝo estas kondiĉo por amikeco, solidareco kaj paco. (jk)

L A N Š K R O U N - Jam tradicie kunvenis 21.10. la esperantistoj (entute 40) el 6 lokaj grupoj de Orienta Bohemio. Oni ekskursis al la loka paperfabriko, aŭskultis partoprenantojn de la 63a UK kaj konkursis rilate la sciojn pri la Esp.movado.

O L O M O U C - EK eldonis jam la 11-an n-ron de sia kluba Cirkulero kun informoj kaj atentigoj.

P L Z E Ň - Inter la 26.9. kaj 1.10.1978 okazis en Sindikata Klubo ŠKODA Internacia Ekspozicio de Infan-desegnaĵoj. Nur dum tri tagoj vizitis la ekspozicion pli ol 500 infanoj. La tutan ekspozicion oni povas mendi ĉe: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jílská 10, 110 00 Praha 1. En kadro de la ekspozicio s-anino E. Seemannová prezentis horeton el poezio de Božena Němcová. Estas preparata artvespero omaĝe al la 119a naskiĝtago de L.L.Zamenhof. Interesatoj skribu al J.Vomáčka, Koterovská 32, 301 41 Plzen, pri informoj kaj tranokto.

T Á B O R - EK preparas kvinmonatajn kursojn de Esperanto, la unua leciono efektiviĝos la 30.10. Propagandon por la kursoj faras belaj malgrandaj afiŝoj kaj flugfolioj.

T E P L I C E - Aŭtunan ciklon de prelegoj preparis Uzina Sindikata Klubo kun EK de internacia amikeco. La prelegintoj parolis i.a. pri Interkosmo, ekskursoj al Sovetio, Popola Koreujo k.a.

Z N O J M O - Publikan rakontadon ligitan kun ekspozicio de bildkartoj kaj suveniroj el Bulgario preparis partoprenintoj de la 63a UK en Varna.

## Junulara seminario

XVI. SEMINÁŘ MLÁDEŽE uspořádaly ve dnech 29.9. - 1.10. v areálu SET Lančov místní skupina svazu v Třebíči a komise ČES pro činnost mládeže. Na programu byly přednášky o činnosti svazu a jeho sekcí, závěrech 63. Světového esp. sjezdu ve Varně, sjezdu TEJO aj.

---


OKAZE DE LA III-a KONGRESO DE ĈEA estos atribuitaj tiuj ĉi honorigoj al meritaj laborantoj de la movado: 1. Honora asocia membro, 2. Honora diplomo kun dumviva membriĝo al ĈEA, 3. Honora rekono de la asocio. La kondiĉojn por atribuo de tiuj ĉi honorigoj starigis la estraro de ĈEA.

---

LEIPZIG ATENDAS VIN! De la 9a ĝis la 11a de marto 1979 la Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo "IFER 79" kunigos 120 diversnaciajn geesperantistojn. Petu aliĝilon ĉe: Kulturbund der DDR, Organiza Komitato de IFER, DDR-701 Leipzig, Käthe-Kollwitz-Str. 115.



FIGURDEKORACIA PORCELANO KUN TRADICIA MARKO
ROYAL DUX BOHEMIA
FABRIKAS
KARLOVARSKÝ PORCELÁN n.p.
UZINO DUCHCOV



# internacia panoramo

GRAVA INICIATO UEA. Prezidanto de UEA D-ro H. Tonkin vizitis en majo rumanan ambasadoron en Vaŝingtono, por ke tiu preparu lian akcepton ĉe influaj personecoj de la politika kaj kultura vivo en Rumanio. Dum posta kvintaga restado en Rumanio D-ro Tonkin traktis i.a. kun ministro de edukado pri Esperanto kaj ĝia nekontentiga stato en la lando. Poste D-ro Tonkin flugis al Irano kaj traktis kun gvidantoj de la Teherana Universitato, kie ĝis nun pli ol 3300 altlernejanoj partoprenis kursojn de Esperanto. En Nov-Jorko vizitis D-ro Tonkin la unuan sekretarion de la Konstanta Misio de Popola Ĉina Respubliko s-ron Wang Fu-sheng kaj konsiliston de la Konstanta Misio de Sovet-Unio ĉe Unuiĝintaj Nacioj s-ron L. Romanov kaj en apartaj interparoloj oni diskutis pri la eksperimenta uzado de la lingvo internacia ĉe UN. Kun la sama celo li vizitis ankaŭ la bulgaran ambasadoron.

B R I T I O - En la brita parlamento ekzistas jam 56 membra grupo de deputitoj por Esperanto.

I T A L I O - En urbo Gorizio kunsidis inter la 19. - 27.8. konferenco de Internacia Ligo de Instruistoj Esperantistoj. Partoprenis ĝin 150 personoj el 12 landoj. La Internacia Ligo de Instruistoj-Esperantistoj estis akceptita siatempe en Uneskon.

N O R V E G I O - Pupteatra Festivalo okazis de la 11. - 14.6. en Tromsø. Dum kvar tagoj pupistoj el Jugoslavio, Pollando, Norvegio, Rumanio kaj Svedio prezentis 26 spektaklojn, el kiuj 19 en Esperanto.

R U M A N I O - En Rumanio estis kreita Esperantologia Kolektivo ĉe Akademio de Politikaj Sciencoj. Prezidanto estas prof. d-ro Bociart, eminenta rumana sciencisto. - Per ministeria dekreto estiĝis ebleco instrui Esperanton en ĉiuj filologiaj fakultatoj de Rumanio.

S V I S L A N D O - Protekton super la 64-a Universala Kongreso de Esperanto en Lucerno, okazonta somere en 1979 transprenis D-ro H. Hürlimann, estonta prezidento de Svislando.

V E N E Z U E L O - En la Centra Universitato de Venezuelo estis starigita katedro de Esperanto.

## Z DOPISNÍ SCHRÁNKY

Na esperanto, ať už na učení nebo na korespondenci, chvilky doslova krademe po večerech nebo lépe řečeno po nocích. Ale přesto bychom chtěli pokračovat a myslíme si, že nám písemný kurs dal hodně, že byl pro nás dobrým odrazovým můstkem pro další práci. Mnoho jazykových jevů, které jsme z korespondence více méně jen tušili, jsme si nyní ujasnili...

P. a J.

P. a J. Pittauerovi, Třešť



## VZPOMÍNKA NA »ESPERANTSKÉ OBDOBÍ«

Jihočeští esperantisté vydávají v Českých Budějovicích zajímavý oběžník "La progreso", který mj. píše o historii esperantských klubů v jednotlivých místech kraje. V čísle 2/1978 byl na řadě Písek. Avšak redakce článek příliš zkrátila a vynechala zmínky o některých jednotlivcích. Proto zde nebyl uveden ani tak významný klasický filolog, jakým je univ. prof. dr. Jaroslav Ludvíkovský, který ve věku 82 let dosud žije v Brně. Jelikož i naše čtenáře může zajímat jeho účast při počátcích esperantského hnutí v Písku, otiskujeme zde výtah z jeho dopisů L. Křivánkovi:

"V letech 1910 nebo 1911 si moji spolužáci Pasovský, Klatovský a j. dopisovali esperantsky s někým v Texasu či Mexiku. R. 1912 na jubilejní výstavě v Písku mělo esperanto svou expozici a prodávalo se tam "Šlosilo". Jeden exemplář jsem si koupil a ovládl jsem ho v krátké době tak, že jsem si své zápisky psal esperantem. Byl jsem horlivý esperantista, odebíral jsem esperantský časopis a hlavně jsem si ovšem dopisoval s jednou milou dívkou jménem Sola Montserrat z Terrassy u Barcelony. Na její počest jsem skládal verše, jako:

Sola la bela, tiu ĉi nomo
ol ĉiu alia pli estas al mi kara.
La plej alta celo por mi, nemodesta homo,
al vi estas diri: Mi amas vin, o klara.

Jednou jsem od ní dostal dopis, silně navoněný jako vždy. Profesor latiny Jaroš chodil kolem mé lavice a náramně se divil, že se kluci navonují. A když mu spolužáci prozradili, že mám v kapse vonavé psaníčko, zajímal se o to, ale nezapomněl mne varovat před esperantem, že prý si jeho studiem zkazím svůj tacitovský styl".

Ve skutečnosti však přestal dr. Ludvíkovský pracovat v esperantském hnutí pro jiné, naléhavější úkoly. Ale dodnes na své "esperantské období" rád vzpomíná.

## KRONIKO

Marie A d a m c o v á, el Brno, festis la 16. 8. en eksterordinara korpa kaj anima vigleco sian 85-an naskiĝtagon. Dum jardekoj ŝi estis komitatanino de EK, reĝisoris kaj mem aktoris en teatraj vesperoj de la Klubo. Kiel delegitino de UEA ŝi peris multajn servojn.

D-ro Vlastimil N o v o b i l s k ý, CSc, estis nomita en oktobro docento de la Pedagogia fakultato en Ústí n.L. Ni gratulas!

En septembro mortis longjara kaj sindona Jindřich P a v e l e k en Brno.

En Plzeň forpasis Ladislav S v o b o d a, aĝa 65 jarojn kaj Miloslav R a c e k, en la aĝo de 64 jaroj.

Sian 70 jaraĝon atingis 21.8. prof. Marie Ž A H O U R K O V Á, sekretariino de la ER ĉe JKP en Polička kaj 80 jaraĝon la 1.10. s-ano Emil D U D E K el Pustá Rybná ankaŭ membro de ER en Polička.

## KORESPONDI DEZIRAS

Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kčs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turniĝu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Ivanĉo Kocev Ivanov, Sofio-stacidomo Ilienci, blok 2, Bulgario • Lilija Zlatanova, str. Klincovska 29, 2500 Kjustendil, Bulgario • Jerzy Leszczyński, 18j. lernanto, Krmieniec, str. Szkolna 4, Pollando • Anatolij Guk, 347900 Taganrog, Rostovskoj. obl. Glavpočtamt, ab. jaščik 43, Sovetio • Francisco Castro Curbelo, Céspedes 22, Tatibonico, Sancti Spiritus, Cuba • Kantareton (I) de J. Cink aĉetos kaj per filatelaĵoj rekompencos Z. Polák, Rudoltice, 563 01 p. Lanškroun • S-ro Beat Spreng, 30j. instruisto, Weihermattstrasse 49, CH-8902 Urdorf, Svislando - dez. kor. aŭ interŝanĝi bk • Ing. Ladislav Kovář, prez. de FS ĈEA, anoncas adresŝanĝon: Říjnové revoluce 1769, 560 02 Česká Třebová • E-libroj el Brazilo aĉeteblaj: Teatro (158 p., 19,- Kčs), Antologio de Brazilaj Rakontoj (305 p. - 57,- Kčs), Esperantista Proverbaro (169 p., 26,- Kčs ), Rui Barbosa (290 p., 29,-Kčs), Por pli bona mondo ( 260 p., 48,- Kčs), Elektitaj poemoj de C. Alves (184 p., 34,-Kčs). Skribu al: S. Marček, Košúty R-5/11, 036 01 Martin, ČSSR.

■

ASOCIAJ EKZAMENOJ. Kiel informis la ekzamena fako de ĈEA oni arangos ekzamenojn pri Esperanto en aprilo 1979 en Prago. Krome estas fiksita limdato enkadre de iu esperantista kunveno ks. - somere aŭ aŭtune en 1979.

■

HONORA REKONO. Okaze de la Gazetara Tago (21.9.) Ĉeĥoslovaka Packomitato atribuis al O. Knichal h o n o r a n rekonon pro la longjara kunlaboro al la gazeto Mír (organo de la Komitato), kiu festas sian 30jariĝon.

■

ESTRARO de Fervojista sekcio de ĈEA bondeziras okaze de la nova jaro 1979 al ĉiuj anoj de FS kaj al ĉiuj esperantistoj.

■

REDAKTORO DE "LA ESPERO" el Seulo, Koreujo, skribas: Ni, esperantistoj kune klopodu por konstrui paĉan mondon respektante reciprokajn situaciojn senrilate al ĉies ismo... Espereble ofte skribu al ni pri viaj novaĵoj. Se vi konas aliajn grupojn kiuj deziras legi nian gazeton, bv. informi nin pri la nomo kaj la adreso.



ĈU VI ŜATAS SIAN ASOCION?
SE JES KAJ VI ĜIS NUN NE PAGIS ASOCIAN MEMBROKOTIZON

NE ATENDU!

NE FORGESU, KE KATEGORIOJ A, B, C KAJ F ESTAS POR ASOCIO PLEJBEZONAJ. DEMANDU VIAN KLUBON PRI EBLECOJ KAJ KONDIĈOJ.

!

KIU INTERESIĜAS PRI BONA ESPERANTO TIU TUJ MENDOS ESPERANTAJN GAZETOJN EN NIA ASOCIO:

| | ABONKOTIZO |
|---|---|
| 1. JUNA AMIKO | 15,- Kčs |
| 2. PACO | 30,- Kčs |
| 3. HEROLDO DE ESPERANTO | 98,- Kčs |
| 4. BUDAPEŜTA INFORMILO | 30,- Kčs |
| 5. STARTO | 24,- Kčs |
| 6. MEDICINISTAJ INFORMOJ | 24,- Kčs |
| 7. PANORAMO (KULTURA ALMANAKO) | 16,- Kčs |
| 8. DER ESPERANTIST | 12,- Kčs |

Numero 2,5,6,7 estas mendebla eĉ fremdlande pere de niaj perantoj. Demandu pri kondiĉoj.
JUNA AMIKO: ANKORAŬ MENDEBLA JARKOLEKTO 1978

## INFORMACE SEKRETARIÁTU

Jako každoročně dostáváte poslední letošní číslo našeho časopisu STARTO i vy, kteří jste členy kategorií E a D. Dozvěděli jste se jistě, že budeme mít III.sjezd svazu ve dnech 10. - 11.2.1979. I vás zveme na tento sjezd jako hosty. Rádi bychom vás zároveň uvítali jako členy kategorie A nebo B, to znamená jako členy, kteří dostávají celý rok náš časopis, další informace a jsou s námi takto ve stálém spojení. Zvažte, zda změna členské kategorie, která je finančně zanedbatelná, nebude tím vaším dárkem svazu. Nejste-li členy žádné místní skupiny, ohlašte nám to korespondenčním lístkem. Roční členský příspěvek v kategorii A je 60,-- Kčs, v kategorii B (pro studenty, vojáky a důchodce s příjmem do 1.000 Kčs) pouze Kčs 30,--. Těšíme se na vaše další zprávy a spolupráci.

Z.Křimský, tajemník svazu

---

Nabízíme vám jednotlivá čísla časopisů "Homo kaj kosmo" a "Scienca mondo" ročníku 1977 se slevou po Kčs 5,--. Jde o zajímavé články psané výborným esperantem, které neztrácejí ani nyní na své aktuálnosti. Objednejte korespondenčním lístkem na adrese svazu.

---




35-a INTERNACIA
JUNULARA KONGRESO
NEDERLANDO




Ĉar ĝis nun ne estas klara ĉu nia asocio sukcesos sendi karavanon por la 64a UK en Lucern (por Junulara Kongreso ni ne preparas karavanon), ciu interesulo mem petu Štatan bankon por deviza permeso. Pli detale ni informos en Starto 1/79.

---

STARTO - nepravidelný věstník ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU, Jílská 10, Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Za obsah odpovídá O. Kníchal. Grafická úprava M. Labašta. Tisk zajišťuje Technické ústředí knihoven při Státní knihovně ČSR Praha. Předáno do tisku 20.listopadu 1978.





1948 1978

30 LET OBCHODNÍCH SLUŽEB

# 30 JAROJ DE KOMERCA SERVO

## PRODÁVÁME

1 * NÁSTROJE A NÁŘADÍ

2 * STAVEBNÍ A NÁBYTKOVÉ KOVÁNÍ

3 * INSTALAČNÍ MATERIÁL PRO VODU A PLYN

4 * STROJE, RUČNÍ DOPRAVNÍ PROSTŘEDKY, ZDVIHACÍ ZAŘÍZENÍ, VENTILÁTORY, KOMPRESORY, ZAŘÍZENÍ PRO POVRCHOVOU ÚPRAVU, SVAŘOVACÍ POTŘEBY, MĚŘICÍ PŘÍSTROJE

5 * KUCHYŇSKÉ POTŘEBY A KOVOVÉ VÝROBKY

6 * STROJÍRENSKÉ VÝROBKY PRO STAVEBNICTVÍ

7 * SVÍTIDLA A ZDROJE SVĚTLA

Naše krajské závody se svou sítí obchodních oddělení, prodejen a skladů slouží socialistickým organizacím i drobným spotřebitelům v hlavních centrech spotřeby obou národních republik.

Vyžádejte si brožurku

OBCHODNÍ NÁPLŇ

## NI VENDAS

1 * INSTRUMENTOJN KAJ ILARON

2 * KONSTRUAĴAN KAJ MEBLAN METALGARNAĴON

3 * INSTALMATERIALON POR AKVO KAJ GASO

4 * MAŜINOJN, MAN-TRANSPORTILOJN LEVILOJN, VENTOLILOJN, KOMPRESOROJN, APARATOJN POR SURFACA ALĜUSTIGO, VELD-BEZONAĴOJN, MEZURILOJN

5 * KUIREJAJN ILAROJN KAJ METALAJN PRODUKTOJN

6 * MAŜINFAKAJN PRODUKTOJN POR KONSTRUADO

7 * LUMIGILOJN KAJ LUM-FONTOJN

Niaj regionaj fabrikoj kun sia reto de komercaj departementoj, vendejoj kaj deponejoj servas al socialismaj organizaĵoj kaj poetkvantaj aĉetantoj en ĉefaj aĉetcentroj de ambaŭ naciaj respublikoj.

Elpetu la broŝuron

OBCHODNÍ NÁPLŇ /Komerca amplekso/

**TECHNOMAT**

NARODNI PODNIK

OBCHODNI ORGANIZACE FMVS